# Dek tagoj de kapitano Postnikov

Recenzas via redaktoro

***Mikaelo Bronŝtejn:*** *Dek tagoj de kapitano Postnikov.* Eld. Tiĥin en Rusio, 2004. 332p.; perglue broŝurita. Takso: xxx

En la jaro 1910 komenciĝis la provo organizi tutruslandan esperantistan asocion. Ĉi tiu historia romano rekonstruas por ni tiujn epokon kaj provon. La libro havas albuman karakteron: intermiksitaj estas tondaĵoj el periodaĵoj, historiaj notoj, rakonto. Pro tio, la legado ne estas vere glata.

Ĉefa fadeno en la romano estas la spertoj de Kapitano Postnikov, kiu strebas organizi tutlandan asocio, sed kiun kontraŭas senĉesa interkon,iktado de la Esperanto-grupoj en Peterburgo kaj Moskvo. En Peterburgo Postnikov opiniiĝas heroo; en Moskvo, lin oni rigardas kiel per"dulon. Ankaŭ lin spionas la rusa registaro, kiu emas opinii Esperanton fremda komploto pereigi la regsistemon de la Caro. Fine, lin kondamnas kaj enkarcerigas la registaro kiel politikan per"dulon. Ĉu prave, ĉu malprave? Tion ni ne scias. Unu el la ĉefprojektoj de Postnikov estas fondi Universalan Ligon, unuiĝon de ĉiuj nacioj — do ja politika ago.

Mikaeolo Bronŝtejn pretendas ke la romano baziĝas sur historiaj eventoj, kvankam ne ĉiuj rolantoj kaj dokumentoj en la romano estas historie aŭtentikaj. Lia maniero prezenti la historion estas iomete konfuza, laŭ mia opinio.

La glubindo estas malfortika; kelkaj folioj elfalis dum mia legado.

*Esperanto sub la Suda Kruco*